Wilhelm Müller,

# Migrado

*tradukita de Friedrich Pillath*

Migrado, mia korplezur'
Migrado!
Sopiras bona muelist'
Migradon ĉiam kun persist',
Migradon!

La akvo ja instruis nin,
Migradi!
Sen ĉes' antaŭen kuras ĝi,
Migradon celas kun pasi',
Migradon!

Modela estas por migrul'
La rado!
Ĝi turnas sin kun gaja bru',
Ne pensas pri haltado plu,
La rado!

La ŝtonoj eĉ kun sia pez',
La ŝtonoj!
Moviĝas ronde kun penad',
Por kuri vete kun la rad',
La ŝtonoj!

. . .

Wilhelm Müller,

# Wanderschaft

Das Wandern ist des Müllers Lust,
Das Wandern!
Das muß ein schlechter Müller sein,
Dem niemals fiel das Wandern ein,
Das Wandern.

Vom Wasser haben wir's gelernt,
Vom Wasser!
Das hat nicht Rast bei Tag und Nacht,
Ist stets auf Wanderschaft bedacht,
Das Wasser.

Das sehn wir auch den Rädern ab,
Den Rädern!
Die gar nicht gerne stille stehn,
Die sich mein Tag nicht müde drehn,
Die Räder.

Die Steine selbst, so schwer sie sind,
Die Steine!
Sie tanzen mit den muntern Reihn
Und wollen gar noch schneller sein,
Die Steine.

. . .

Migrado, mia korplezur',
Migrado!
Adiaŭ majstro kaj majstrin',
Jam sen kolero lasu min,
Migradi!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderschaft" de* WILHELM MÜLLER *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* FRIEDRICH PILLATH *(†1932-04.03).*

*Arg-605-1218 (2012-10-04 18:59:30)*

*Verkita de la poeto Vilhelmo Mulero (Wilhelm Müller, 07.10.1794 - 01.10.1827). Esperantigis: Friedrich Pillath (= Zanoni), † 03.04.1932, laŭ la origina germanalingva teksto. La tekston de tiu ĉi kanto-traduko mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kant-libro "Junularo kantas", kompilita de Germana Esperanto-Junularo en 1953-01-12 (subskribis: Franz Josef Scholz), eldonejo: Limburger Vereinsdruckerei. [Laŭ informo de la Viena Esperanto-Muzeo, s-ro Christian Cimpa, „Zanoni" estis la pseŭdonimo de Friedrich Pillath. Pri tiu vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`*.]*

O Wandern, Wandern, meine Lust,
O Wandern!
Herr Meister und Frau Meisterin,
Laßt mich in Frieden weiter ziehn
Und wandern.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* WILHELM MÜLLER *(∗1794-10-07 – †1827-10-01).*

*Arg-605-1217 (2012-10-04 19:07:43)*

*Pri la poeto Wilhelm Müller vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller_(Dichter)`*.*